




star^{to}

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



1981 · 3 · (85)



HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon — kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas: la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ
— oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro —

KARLOVY VARY - FRANTIŠKOVY LÁZNĚ - MARIÁNSKÉ
LÁZNĚ - JÁCHYMOV - TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY - JANSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ - JESENÍK
LUHAČOVICE - TEPLICE NAD BEČVOU

BALNEA *

Reprezentanto de ĉeĥoslovakaj banlokoj kaj kurac-fontoj.
PARIŽSKÁ TRĪDA 11, 110 01 PRAHA 1, ĈEĤOSLOVAKIO
Tx: 122 215

REFORTIGO DE LA KONTAKTOJ KUN UNESCO

Per tiu ĉi rimarko ni revenas al akcepto de UEA-delegitoj per la ĝenerala direktoro de UNESCO s-ro Amadou Mahtar M'Bow en Parizo la 17-an de marto 1981. Pri tio informas aprila numero de ESPERANTO, organo de UEA. La delegacion formis la prezidanto de UEA G.Maertens kaj la komitatano por eksterlandaj kontaktoj eks-prezidanto de UEA D-ro H. Tonkin./ vidu la foton sur titolo paĝo/.

Temis pri renkontiĝo de la gvidaj funkciuloj de du internaciaj organizaĵoj, kiuj ĉiam pli kaj pli intime kunlaboras. La rilatoj inter la du organizaĵoj jam delonge ne estas nur informaj kaj konsultaj, ili fariĝis kunlaboraj, je ambaŭflanka kontento. Por ĉijara Kongreso en Brazilio venos speciala reprezentanto de UNESCO kun persona mesaĝo de Amadou M'Bow.

Demandita pri opinio, kiel reliefigi la lingvan problemon en UNESCO, s-ro M'Bow konsilis, ke tio okazu pere de la konstanta komitato de la neregistritaj organizaĵoj ĉe UNESCO, kie UEA kiel ĝia membro gvidas ĝuste la laborgrupon pri komunikado.

UNESCO kaj ĝia ĝenerala Direktoro kalkulas, ke estos planita ankau solenaĵo al Centjara jubileo de Esperanto en 1987a jaro en sidejo de UNESCO. S-ro M'Bow promesis persone partopreni.



Dum 16.4. - 22.4.1981 en Přerov /ĈSSR/ okazis 14-a konsultiĝo de SLEO-j. Partoprenis reprezentantoj de sekvaj Esperanto-organizaĵoj:

AE SSR, ASE, Bulgara E.Asocio, Centra Laborrondo Esperanto en Kultureligo de GDR, Ĉeĥa E.Asocio, Hungara E.Asocio, Pola E.Asocio, Vjetnama Pacdefenda E.Asocio.

Unuopaj delegacioj informiĝis pri atingitaj rezultoj de partoprenintaj SLEO-j, interŝanĝis laborplanojn, spertojn kaj informojn el diversaj intereskampoj. Ili akceptis rekomendojn por ligi pli profundajn kaj multflankajn laborkontaktojn inter siaj asocioj kaj kun tiuj organizaĵoj kie levigas intereso pri Esperanto, kiel ekz. ĉe turistaj instancoj.

La Konsultiĝo aprobis rezoluciojn pri la internacia politika situacio kaj pri la solidareco kun Vjetnamio, Laoso kaj Kampuĉio.

La partoprenantoj esprimis siajn dankojn al Ĉeĥa E.Asocio pro la certigo de bonaj laborkondiĉoj.



Dum festa akcepto de la delegitoj bonvenigis ĉeestantojn ankaŭ prezidanto de la E-klubo. Přerov s-ano Cityil

REZOLUCIO

La reprezentantoj de la Esperanto-organizaĵoj en socialismaj landoj kunvenintaj en la urbo Přerov, Ĉeĥoslovakio, esprimas sian grandan zorgon pri la akriĝinta monda situacio, kiu ekestigis pro la kulpo de la plej agresemaĵ imperiismaj rondoj en okcidentaj ŝtatoj.

Kiel konsekvencaĵoj agantoj por la paco kaj amikeco inter la popoloj, ni forte indignas kontraŭ la semantoj de malamo kaj provokantoj de interŝtataj konfliktoj.

Ni senrezerve subtenas ĉiujn sociajn fortojn, organizaĵojn kaj movadojn, kiuj energie kontraŭstaras la fabrikadon de nukleaj kaj neŭtronaj armiloj, destinitaj por lokigo sur la teritorio de okcidenta Eŭropo.

Ni plenforte subtenas la porpacajn iniciatojn de la socialismaj landoj - frunte kun Soveta Unio - kaj de aliaj landoj pri senkondica intertrakto koncerne la forigon de ĉiuj nukleaj armiloj el Eŭropo, kiuj minacas ties ekziston.

Ni alvokas la esperantistaron de la tuta mondo unuigi kaj decidi sin ankoraŭ pli fervore al la plej urĝa kaj nova afero: la forigo de la militdanĝero kaj la konservo de la vivo sur la tero!

La esperantistaro agu por ke la internacia streĉiteco ne damaĝu al la monda Esperanto-movado.

II

La Konsultiĝo substrekante ke nur sub pacaj kondiĉoj la Esperanto-movado povas progresi, post aŭskulto de raportoĵoj, proponoj kaj diskutoj opinias utile:

- ke la landaj asocioj direktu sian laboron por verbado de freŝaj fortoj kaj ties eduko kaj altiro al gvidorganiza agado,
- helpadu la junularajn sekciojn de la organizado de laborbrigadoj, festivaloj, oratoraj konkursoj, internaciaj renkontoj,
- organizu semajnojn kaj dutagajn seminariojn kaj kursojn por pedagogoj kaj kadruoj de loka, departementa kaj landa signifo,
- plintensigu la aplikadon de Esperanto en neesperantistaj medioj kaj organizaĵoj, en turismo, kulturo kaj arto,
- ellaboru proponojn pri kompilo de fakvortaroj kaj de terminaroj pri la socialisma socio,

- plibonigu la perspektivan planadon de siaj aktivecoj kaj pli frue interŝanĝu laborplanojn por tiel kunordigi sian laboron,
- iniciatu kaj pliaktivigu interlingvistikajn kaj esperantologiajn esplorojn kaj sociologiajn esplorojn pri la Esperanto - movado en socialismaj landoj laŭ sperto de ĈEA.

Přerov, la 22-an de aprilo 1981

Reprezentantoj de SLEO-j de Bulgario, ĈSR, SSR, GDR, Hungario, Pollando, USSR, Vjetnamio

BUDAPEŝTA ESPERANTO-CENTRO DE UEA

pri eldona kaj sciencteknika agadoj

Okaze de la malfermo de nova Oficejo de Universala Esperanto - Asocio vizitis Budapeŝton s-ro Grégoire MAERTENS, prezidanto, dr. Flóra SZABÓ-FELSŐ ĝenerala sekretario, kaj s-ro Victor SADLER ĝenerala direktoro de UEA. La 28-an de marto estis subskribita kontrakto inter UEA kaj Hungara Esperanto-Asocio pri malfermo de Budapeŝta Esperanto-Centro pri eldona kaj sciencteknika agadoj.

Ĉi-sube ni publikigas kelkajn punktojn de la kontrakto:

1. Reprezentantoj de UEA kaj HEA konsentis kaj akceptis, ke : Por pli efike helpi al la evoluo kaj disvastigo de la esperantlingva scienca kaj faka literaturo kaj beleto, UEA kaj HEA kunlaboras por nelimitita tempodaŭro, kreante kernon de oficiistoj kaj laborantoj por oficejo de UEA en Budapeŝto.
2. Tiu grupo de oficiistoj kaj laborantoj, aŭ ties oficejo, nomigos en movadaĵ medioj "Budapeŝta Esperanto-Centro de UEA pri eldona kaj sciencteknika agadoj".

La kontrakton subskribis G.Maertens kaj dr. Flóra Szabó - Felső parte de UEA kaj dr. E. Baráth ĉefsekretario kaj dr. I. Pethes vicprezidanto de HEA.

Dr.Prof. Ottó Haszpra, komitatano de UEA, vicprezidanto de HEA gvidos la ĵus malfermitan oficejon. Li jam prezentis al la subskribintaj estraranoj de UEA kelkajn valorajn kaj prespretaĵajn manuskriptojn de sciencteknikaj libroj.

Sabate s-ro G.Maertens renkontigis kun dr. Vilmos Sággy, ministro pri enlanda komerco de Hungario, gvidinto de la hungara delegacio en la Manila Konferenco pri Turismo. Ili kune kun Márton Lengyel, vicedirektoro de Landa Fremdultrafika Oficejo de Hungario kaj kelkaj estraranoj de HEA vizitis la standon de HEA ĉe la ekspoziciaro "UTAZÁS-81"/Vojago-81/.



BULGARIO 1300 JAROJ

En 681 estis kontraktita pactraktato inter la bulgara ĥano Asparuĥ kaj la bizanca imperiestro. Tio estis akto pri internacia agnosko de la nova ŝtato. De tiam devenas la oficiala tempokalkulo de Bulgario.

La Unua bulgara ŝtato, ekzistinta dum pli ol tri jarcentoj centre de la Balkana ĝuoninsulo, postlasis gravan spuron en la historio de tuta eŭropa civilizacio. Tiu ŝtato rebatante la senĉesajn atakojn de nordaj nomadaĵ triboj kaj rezistante kontraŭ la sudaĵ atakoj de la plej potenca imperio - la mezepoka Bizanco, ludis gravan rolon en la tempo de la frua eŭropa Mezepoko.

La ekzistado de la nova nacio, formiĝinta rezulte de kunfandigo de slavoĵ, prabulgaroj kaj antikvaj tracoj kaj nomata de la samtempuloj "bulgaroj", fariĝis jam fakto.

Fine de IX kaj komence de X jc. la bulgara ŝtato atingis la kulminon de sia prospero kaj potenco. Tio estis la tempo, kiam kreiĝis ĝiaj skribo kaj spirita kulturo, disvastiĝintaj poste inter ĉiuj orientaĵ kaj sudaĵ slavoĵ.

La bulgaraĵ reĝoj estis multflanke naturdotitaj personoj. Inter ili aparte distingigas la figuro de Simeono /894 - 927/. Post ĉirkaŭ duonjarcento de post la morto de Simeono lian ĉefurbon eniris armeo de la bizanca imperiestro Johano Cimisiĥij. Laŭ informoj de analisto li ordonis al la lasta reganto de Orienta Bulgario "demeti la simbolon de bulgara regpotenco - la purpuran ĉapon broditan per oro kaj perloj, la purpuran mantelon kaj la rugajn botojn". La riĉege ornamitan kaj orplakitan faman preslavan ikonon de Plejsankta Dipatrino oni forportis kiel trofeon al Konstantinopolo.

Dum en Orienta Bulgario okazis tiuj eventoj, en Okcidento renaskiĝis la Unua bulgara ŝtato. La bizanca kronikisto Johano Skilica skribas, ke en Okcidenta Bulgario "bulgaroj elektis kvaropon da fratoj - Davido, Moiseo, Aaron kaj Samuele kiel novajn regantojn. Baldaŭ regentestro de Okcidenta Bulgario fariĝis Samuele - unu el la plej grandaj personoj en la bulgara historio. Bizanco ne povis haltigi la premon de liaj armeoj. Sed iom post iom Bizanco komencis prepari sin al reveno kun la Okcidentbulgara ŝtato. La decida batalo okazis en 1014. Imperiestro Vasilij la Dua, alnomita "Bulgaromurdinto", militkaptis ĉirkaŭ 15 000 bulgaraĵ soldatojn. Laŭ lia ordono ĉiuj estis blindigitaj kaj nur je ĉiuj cent soldatoj oni lasis po unu unuokula kiel gvidanton. Kiam Samuele vidis tion, trafis lin korkrizo kaj post du tagoj, je la 6a de oktobro 1014 li forpasis.

Aŭtune de 1018 falis la lasta bulgara vojevodio. Fiera pri sia venko atingita en batalo, kiu daŭris tridek jarojn, la "Bulgaromurdinto" reiris al Konstantinopolo. "Bulgario, taksata nealirebla, vasta, nevenkebla - skribas analisto Atalist - ĉesis ekzisti."

La Unua bulgara ŝtato estis frakasita. Sed restis la bulgara popolo. Dum la plej pezaj jaroj de la bizanca jugo ĝi batalis por restarigo de sia ŝtato. La batalo daŭris jarcenton kaj duonon, ĝis ĝi kroniĝis per fondo de la Dua bulgara ŝtato.

D-ro Georgi Georgiev /Bulg. Esperantisto/

KONGRESO DE POLAJ ESPERANTISTOJ

okazis en la tagoj 2 - 4 - 04 en Katowice. La atmosfero de la traktadoj estis respegulo de la pola samtempo. Por la partoprenanto, kiu jam alkutimiĝis al certa agadmaniero en sia lando, la preparoj kaj traktadoj impresis iom embarase. Ekz. la elekto de la asocia prezidanto estis tute netradicia, ĉar kiu ajn el la delegitoj dum la traktadoj donis sian proponon senpritrakte. La listo de kandidatoj ne ekzistis. Mi memoras pri jena situacio: iu persono estis proponita je prezidanto ĉefe pro bona scio de Esperanto kaj pro tio, ke en sia loĝloko li bone prezentis Nikolaon...

Per tio mi tamen ne volas aserti, ke oni partoprenis la traktadojn kun malgranda intereso aŭ ke ni ne travivis multajn interesaĵojn. Niaj polaj amikoj modele zorgis pri ni, ni trarigardis ankaŭ la urbon kun vasta ĉirkaŭaĵo kaj partoprenis amikan vesperon.

Vi, kiuj eble ankoraŭ ne konas la rezultojn de balotado en PEA notu, ke la prezidanto estas D-ro Leik, juna homo plu frue konata en la medio de pola studenta junularo /PSEK/, la sekretario de PEA estas ree Ewa Kuligowska.

Nia federacio transdonis sian simblon donacon al PEA - belan plumbvitraĵan kolekton kun la motivoj de nia ĉefurbo kaj bondeziris, ke la estonta laboro ligiĝu kun tiuj bonaj tradicioj, kiuj glorigis PEA.

- kŭz -



1. El kongreso-ĉjo
2. Juna gvardio de PEA
3. Amika etoso en internacia medio dum ĝaja vespero

1 | 2
13



GENERALA JARKUNSIDO DE HEA

La 21/22-an de marto 1981 en la Kulturdomo LÁNG, Budapeŝto okazis la ĝenerala jarkunsido de HEA.

Sabate posttagmeze post enkondukaĵaj vortoj de d-ro Ferenc NE-ZVÁL, prezidanto de HEA, komenciĝis la jarkunsido per salutvortoj de reprezentantoj de diversaj sociaj organizaĵoj. Salutis la jarkunsidon József TIMMER, vicĉefsekretario de Landa Konsilio de Sindikatoj. La Centran Komitaton de Hungara Socialisma Laborista partio reprezentis Péter FODOR, la Landan Packonsilion István TERÉNYI, vicprezidanto.

En la nomo de Estraro de BEA salutparolis Ljubomir MIHAJLOV, Esperantistojn el Ĉeĥoslovakio reprezentis per varmaj salutoj Magda ŠATUROVÁ kaj František ŠATURA. En nomo de CLE de Germana Demokratia Respubliko parolis Linde KNOSCHKE.

Pro siaj elstaraj E-laboroj ricevis la distingon "Pro eminenta sindikata laboro" Jenő MOLNÁR /ora/, Dr. Prof. Ottó HASZPRA /ora/, Bernadette MIHÁLYI /argenta/ kaj Dr. József FULOP, argenta gradoj. Ricevis sindikatan honordiplomon Antal JÁRÓ kaj Ernő CSISZÁR.

La ĉi-jaran "PRO ESPERANTO" memormedalon de HEA transdonis Imre KUTAS, ĉefsekretario al István TERÉNYI, Vilmosné KHEK kaj Lajos KÖKENY. La saman honorigon transprenos Dr. Detlev BLANKE /GDR/.

La duan parton enkondukis Dr. Endre BARÁTH, vicprezidanto, per konciza raporto pri la rezultoj de hungara E-movado dum la lastaj kvar jaroj. Dr. BARÁTH emfazis la fruktodonajn kontaktojn kun kelkaj sociaj organizaĵoj. Pri la buĝeto raportis Tibor VASKÓ, sekretario de HEA. Li alvokis al ĉiuteren aŭ sparado por intereso de pozitiva buĝeto de HEA.

Dimanĉe Márton LENGYEL, vicprezidanto de Landa Fremdultrafika Oficejo aparte salutis la jarkunsidon. Ankaŭ la dimanĉaj alparolantoj aldonis kromajn informojn pri la rezulta E-movado en Hungario.

Pri la laboro de komisiono por kandidatigo raportis Bálint SZILÁRD.

Laŭ Budapeŝta Informilo

ESPERANTO - OLIMPIADO 1981

La Esperanto-Olimpiado eniras en la kvaran jaron. Pasintjare en la tria rondo 1980 sukcesis Františka Kloučková el Mělník, Jan Duda el Olomouc kaj Jindřich Tomášek el Říkovice, kiuj startis la olimpiadon en 1978. La duan rondon 1980 atingis Rudolf Šindler, Libor Krejčí, Max Hillebrand, Josef Filip kaj Antonín Bombionka. La unuan rondon 1980 plenumis prof. Jaroslav Polenský, Ing. Jiří Kreuzberger, Ladislav Chmelík kaj Ing. Vladimír Ondryáš. Ili ricevis libropremion. Al ĉiuj ni sincere gratulas.

Por 1981 ni publikigas la taskojn por ĉiuj tri rondoj, sed atentigante ke pli altan rondon povas partopreni nur tiu, kiu ellaboris la taskojn de la malpli alta.

I-a rondo: a/ Kreu 10 propoziciojn kun sufikso -IGI uzita ĉe substantivoj /ekzemple: muro - la patro surmurgis bildon/

b/ Priskribu kunvenojn en via Esperanto-klubo

II-a rondo: a/ Kreu dek propoziciojn, en kiuj vi uzus predikativon /ekzemple: li opiniis lin bona/

b/ Verku rakonton aŭ poemon uzante jenajn vortojn: domo, hundo, riĉi, drinki, herbo, ankaŭ

III-a rondo: a/ Priskribu la vivon kaj verkon de iu eminenta esperantisto

b/ Verku artikolon pri vestado uzante minimume 30 terminojn el ĉi tiu fakto.

Ne forgesu skribi al via laboro jenan deklaron:

"Mi aliĝas al la I-a /II-a, III-a/ rondo de la Esperanto-Olimpiado 1981 kaj deklaras, ke mi ellaboris la taskojn sola sen helpo de aliulo."

La taskojn sendu ĝis la 31-a de decembro 1981 al adreso:

Miroslav Malovec, Slovákova 9, 602 00 B r n o, Ĉeĥoslovakio.

BELARTA SEKCIO DE ĈEA informas...

Kadre de nia Asocio ekfunkciis Belarta Esperanto-Sekcio /BES/, kies agado ĝojige evoluas. Ĉiaj programoj okazas unufoje monate en la kafejo "Na Valdeku", Praha 2, Mírové nám.1.

Ĉiam post la prezento de la invitita aŭtoro sekvas deklamado aŭ legado el lia verkaro ĉefe kaj en Esperanto, poste oni diskutas pri la problemoj de la verkado. La aŭtoro respondas ktp. Jam estis prezentitaj al la publiko el ĉefaj aŭtoroj: meritplena artisto Fr. Kožík, Fr. Lazecký, J. Karen, J. Rumler, Č. Vidman, Eva Kotarbová, Jar. Mazáč. Ĉiuj aŭtoroj estas konataj al ĉefa legantaro kaj eldonis ĉefe la poezilibrojn. Oni preparis jam sufiĉe ofte la ripetadon de tiuj programoj en Havlíčkův Brod, en Písek, Pardubice kaj aliloke. La 19-an de januaro 1981 okazis programo, kie ni prezentis al publiko la junajn aŭ literaturkomencantajn aŭtorojn: B. Čapková, D-ro J. Škoda, J. Krejčová kaj aliaj. Grava estas la fakto, ke unuopaj aŭtoroj ĉiam invitis al tiuj aranĝoj siajn geamikojn kaj per tio en Praha plimultiĝas la nombro de Esperanto-amikoj kaj simpatiantoj el la literatura sfero.

Dum ĉi tiu jaro 1981 ni prezentas al publiko niajn ĉefajn E-poetojn kaj tradukistojn: Eli Urbanová, Jiří Kořínek, J. Vondroušek, O. Kníchal, K. Píř, Valda Vinař kaj ripete la aŭtorojn J. Rumler, Fr. Lazecký, Č. Vidman. Enkadre de la programo ni preparos ankaŭ du informaranĝojn por nia presaro, televido kaj radio. Por la venontaj jaroj oni planas kunlaboron kun E-aŭtoroj el Slovakio, Hungario, Pollando, Sovetunio, GDR ktp. Ni volas uzi la fragmentojn el Slovaka antologio por prezenti la slovakajn literaturon. La aŭtorojn prezentos literature J. Rumler, diskuton direktas J. Karen, recitas Eva Seemannová kun siaj helpantoj. Gitare akompanas B. Čapková. Pli poste oni planas ankaŭ la literaturajn programojn kun elstaraj aŭtoroj el aliaj landoj, ĉefe kunlaborantaj kun literatura revuo FONTO.

Okaze de la IIIa renkontiĝo de Pacdefendantoj en Pardubice '81 preparis la Sekcio la prezentadon de 3 aŭtoroj /Karen, Lazecký, Krejčová/ en aparta literatura programo, kiun ĉeestis pli ol 50 personoj. La poemojn sukcese recitis Eva SEEMANNOVÁ. La dis-

kuto pri literaturaj programoj de BEA estis tre aktiva. Oni proponas aranĝi similajn renkontiĝojn regule kaj okaze de klubaj aŭ regionaj aranĝoj. Informojn sendos al vi la sekretario de BEA, Jiří Karen, 108 00 Praha 10.
La literaturan agadon de BEA menciis Heroldo de Esperanto, Hungara vivo n-ro 6/1980 kaj Slovaka esperantisto n-ro 3/1981
Jiří Karen

Literatura sekcio de ĈEA eldonis en la jaro 1980 la poezian almanaketon 1980 /16 pagoj/. Ĝi enhavas la kontribuojn far 10 ĉeĥaj poetoj /esperantistoj aŭ amikoj de Esperanto/. Parto de la enhavo estas verkita originale en E-o /Karen, Kořínek, Pič, Rumler, Urbanová, Vinař/, parto estas tradukita far J. Kořínek /Bár, Kožík, Lazecký, Vidman/. La belaspekta publikaĵo havas titolon "Niaj aŭtoroj sin prezentas al vi". La prezo 10 Kčs. Ĝi estas mendebla ĉe ĈEA, Praha 1, Jileská 10. Ni petas disvendi ĝin okaze de viaj renkontiĝoj. Oni jam preparis almanaketon por la jaro 1981.
Jiří Karen

Čedok [KAJ] Esperanto

Temas pri nenia nia iluzio aŭ ĵurnalista malvero se ni asertas, ke nia plej granda turisma agentejo komencis grave interesiĝi pri Esperanto kaj ĝia uzo en la sfero de turismo.

Nian leteron kun propono de nia Asocio post la rezultoj de Monda konferenco en Manila en oktobro 1980, la agentejo ČEDOK tre favore respondis. La gvidantoj de nia Asocio jam traktis kun la reprezentantoj de Čedok kaj transdonis al ili kelkajn konceptajn proponojn kiel agoplenumi la ferman rezolucion de tiu ĉi Konferenco.

Montriĝas la espero, ke efektiviĝos baldaŭaj kontaktoj, kiuj rezulte ankaŭ signifos subskribon de interkonsento pri kunlaboro inter ĈEA kaj ČEDOK kun la Monda turisma movado por disvastigo de turismo por esperantistoj kaj helpe de Esperanto.

Kaj tial jam nun ni serĉas interesulojn, kiuj estus fakte kapablaj kaj intencus kunlabori kun Čedok kiel ĉiĉeronoj en siaj loĝlokoj. Kondiĉoj: asocia ekzameno el Esperanto kaj ĉiĉerona ekzameno ĉe la organoj de Čedok.

Same estas bezone pristudi la eblecojn de niaj bazaj grupoj kaj prepari konvenajn kultur-turismajn programojn, kiujn ni povus proponi al Čedok por eluzo unuavice por eksterlandaj turistoj kaj speciale por la zono de ne-socialismaj ŝtatoj.

Je nia alvoko ankaŭ reeĥis ceteraj turismaj oficejoj, ekz. REKREA. Kun tiu ĉi certe ne malgrava agentejo ni tamen ankoraŭ ĝis la redaktofermo de tiu ĉi numero ne traktis.

EL LA AGADO DE SCIENC-TEĤNIKA SEKCIO DE ĈEA

Inter la sferoj, kie Esperanto estas pleje uzebla, la scienco-kaj teĥniko okupas tre gravan rolon. Nur praktika uzado de la Internacia lingvo povas ŝovi niajn planojn antaŭen. Tial la streboj de la Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA koncentriĝas al la laboro en fakaj grupoj. En ĉiuj branĉoj de la homa agado estas necese verki, aŭ traduki fakajn tekstojn, kompili aŭ kompletigi terminarojn. Por ĉiu fakulo estas utile havi kontaktojn kun samfakuloj eksterlande.

Tre efika formo de faka laboro estas aranĝado de Seminarioj pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Teĥniko /SAEST-oj/. Ili fariĝas la platformo, kie la unuaj fakuloj renkonte kun alilandanoj prezentas siajn kontribuojn al la starigita temo.

Interkonsente kun la slovaka sekcio la seminarioj /aŭ konferencoj/ okazadas ĉiujare, alterne en Ĉeĥio kaj Slovakio.

La ĝisnun okazintaj seminarioj Žilina 78 kaj Ústí 80 estis tre sukcesaj kaj montrigis altigantan tendencon. La samon oni povas serioze supozi ankaŭ pri la ĉijara Žilina 81, kiu dediĉos multe da tempo al la komputiko.

Kvankam Žilina 81 ankoraŭ ne okazis, la ĉeĥa sekcio okupiĝas jam pri SAEST 82 en České Budějovice. Estis starigita la ĉefa temo: Energio - la tutmonda problemo. Intence estis elektita tiu tre larĝa temo, al kiu povus kontribui ĉiuj fakoj pritraktante pli efikajn aŭ tute novajn metodojn de produktado, pli efikan uzadon, ŝparadon per pli bona transformado de energio, per konstruado de energio pli konvenaj konstruaĵoj, la rilaton inter la samo kaj konsumo de energio ktp. Ĝi enhavos ankaŭ lingvologiajn prelegojn.

Lau lastaj informoj la salono kaj klubejoj estas jam rezervitaj, oni loĝos malmultekoste en studenta hejmo, la organizantoj klopodas eldoni la prelegaron antaŭe, por ke la partoprenantoj povu prepari sin pli bone por diskutado.

Provizora dato estas vendredo ĝis dimanĉo 1982-08-27/29. Ĉi okaze ni apelacias al ĉiuj: aligu al iu faka grupo, kiu povus interesi vin aŭ laŭ via profesio aŭ laŭ via ŝatokupo. Tute ne estas kondiĉo esti sciencisto aŭ altranga teĥnikisto. Eĉ eta kunlaboro estas grava por nia agado.



ni recenzas

"APOSTOLO DE LIBERECO" en Esperanto.

En la tagoj de la 40a jubilea kongreso de BEA en Plovdiv sur la kongresa librostando aperis nova libro: Apostolo de libereco-portreto de Vasil Levski sur la fono de Bulgario de la 19-a jarcento. Aŭtoro de la libro estas Mercia MacDermott, doktoro pri historiaj sciencoj, anglino, dediĉinta grandan parton de siaj sciencaj verkoj al la historio de la bulgara popolo. Tradukinto estas la elstara bulgara esperantisto-veterano Nikola Aleksiev, eksprezidanto de MEM, komitatano kaj honora membro de UEA. La esperanta eldono feliĉe koincidas kun la 13-jarcenta jubileo de la bulgara ŝtato /681 - 1981/. Libron vendas nia asocio por 43Kĉs.

František Hýbl: Komeniolog Josef Krumpholtz - propagator mirového hnutí a jednotného světového dorozumivacího jazyka - esperanta.

Studia comeniana et historica VIII/1978 /19/, pĝ. 56 - 74

La aŭtoro, d-ro F. Hýbl, faka kunlaboranto de Okresní vlastivědné muzeum J.A. Komenského en Přerov, dediĉas ampleksan studon en la ĉeĥa lingvo al la elstara protagonisto de Esperanto inter ĉeĥoj - Josef Krumpholtz. La artikolo estas kompletigita per 46 specialaj klarigoj kaj 6 bild-aldonoj.

En la ĉeĥaj fakaj medioj estas J. Krumpholtz ĝenerale agnoskata kaj respektata kiel elstara komeniologo. Sed liaj meritoj pri la fondo kaj disvolvado de la ĉeĥa Esperanto-movado estas inter esperantistoj multe malpli konataj. D-ro Hýbl per sia eminenta studo atentigis la ĉeĥan publikon ankau pri tiu ĉi laborkampo de J. Krumpholtz. Estas dezirinde, ke ankau esperantistoj omagu al li en proksima estonteco similan studon en la internacia lingvo. J. Krumpholtz meritas tion.

V. Novobilský

el leterkesto

...Pasintsemajne mi ricevis la libreton "Meze de Eŭropo" kaj mi devas sincere gratuli al vi pro ĝia eldono. La legantoj ricevis sur bonega papero belaspektan, belstilan kaj bonenhavenan legaĵon kaj la eminenta tradukarto garantias altkvaliton. La libreto estas rekomendinda ankau kiel tauga donaco eksterlanden kaj estas dezirinde havi pli da similaj publikaĵoj.

Milada Josková

Al la redakcio de The Worker Esperantist, kiu en sia aprila numero /315/ 1981 pripensas la signifon de nia frontpaĝa "PF 81 al niaj legantoj deziras la redakcio" /en n-ro 6/1980/, ni klarigas, ke en niaj landoj ĝenerale uzata PF fontas el la francalingva "Pour félicité" kaj do havas bondeziran sencon, kiun sugestas la redakcio de TWE. Dankon!

internacia panoramo

Danke al almozado en la koridoroj de la metroo de Barcelona povas vivi 100 malriĉaj familioj.

En R.E.N.F.E. /hispana fervojo/ oni laboris 22 milionojn da kromaj horoj en 1980 dum en la lando estas miliono kaj duono da senlaboruloj.

El la 122 milionoj da infanoj, kiuj naskiĝis en la jaro 1979, Internacia Jaro de la Infano, jam mortis laŭ UNICEF 12,2 milionoj.

/Hisp.Esp.Asocio "Anton Balague" 2/1981/

Unu monumento de Zamenhof estis inaŭgurita en 1914 en Františkovy Lázně.

Unua Esperanto-libro - 26a de julio 1887.

Unua adresaro kun mil adresoj de personoj lernintaj Esperanton aperis 1889 en Varsovio.

Unua artikolo pri Esperanto aperis la 7an de aŭgusto 1887 en Varsovio /Kurjer Codzienny, titolo "Anti-Volapük"/.

Unua rekono de Esperanto kiel klara lingvo por telegramoj - 1924. Proponita: Ligo de Nacioj, akceptita en 1925 per Universala Telegrafa Unio.

Unua originala poemo en Esperanto -1887- "Mia Penso" de Zamenhof.

Unua poŝtmarko kun la teksto "Popov-Inventisto de Radio" aperis en 1925 -Sovetunio- en du valutoj: 7 kaj 14 kopekoj.

Unua strato honore al L.L.Zamenhof inaŭgurita en Sabadell - 1912 - Hispanujo.

Unua teatra prezentado en Esperanto estis "Brandfaristo" de Tolstoj en Smolensk la 27an de septembro 1896.

/El Enciklopedio de Esperanto/-jelĉ

UZBEKISTANO. Laŭ la iniciato de esperantistoj en Samarkand la alvoko publikigita en pluraj esper. presorganoj sendi infandeseĝnaĵojn por la ekspozicio elvokis en Ĉeĥoslovakio tian eĥon, ke ke Regiona Biblioteko de Puŝkin kaj la Esperantista Klubo en Samarkand en februaro kaj marto '81 aranĝis specialan ekspozicion de ĉeĥoslovaka infanarto "Infanoj el Ĉeĥoslovakio pentras..."

Tiucele estis eldonitaj specialaj grandformataj afiŝoj kaj vere belaspektaj invitiloj, kiujn kun la informo ni ricevis de kara STARTO-leganto Petro Poliŝtuk.

jelĉ

Esperanto-Klubo ĉe Vojevodja Kulturdomo, Ściegienny-strato 6 PL-25-953 K I E L C E, Pollando dum oktobro '81 aranĝos ekspozicion omaĝe al 20-a datreveno de la Klubo. Diversaj esperantaĵoj, bildkartaj kaj leteraj salutoj estas bonvenaj.

)Lingva angulo(

Ĉu la fonemo "h" estas eksterminda arkaikaĵo ?

Ekzistas tendenco anstataŭigadi sisteme fonemon h ker k. Nia elstara lingvofakulo Bernard Golden asertas en sia artikolo en Starto 1980 6/82, ke vortoj kun h, kiel teĥniko, ĥemio ekscitas lin, ke ili apartenas al "arkaika dialekto". Ing. Jan Wener en sia respondo samnumere defebdas kaj motivigas la ekzistrajton de fonemo h en moderna kaj scienca lingvouzado.

Ni rigardu iom la problemon. Ekzistas lingvoj, kiuj ne havas la fonemon h /kiel ekz. la angla, la hungara k.a./, kaj estas lingvoj kie mankas la fonemo h /kiel ekz. la rusa, la serbokroata k.a./ Plue estas lingvoj, kie ekzistas ĉiuj tri fonemoj h, ĥ, k /kiel ekz. la germana, ĉeĥa k.s./. Estus domage malriĉigadi Esperanton je tiu ĉi fundamenta konsonanto pro tio, ke ĝin ne havas ĉiu lingvo, eĉ se tiel grava kiel la angla. La rusoj povus insisti pri forigo de "h", japanoj pri forigo de "l", ĉinoj pri forigo de "r", finnoj eĉ pri forigo de kelkaj konsonantoj, kiujn ne havas ilia lingvo. Ŝajnas al mi, se ni juĝus pri la fonemo h laŭ ĝia disvastigiteco, ke ĝi ege venkus, ĉar ĝin havas la plej grandaj lingvoj kiel la ĉina, araba kaj multaj aliaj. Se ni limiĝus je fonemoj ekzistantaj en ĉiuj lingvoj, ni devus redukti Esperanton je nura torso.

Se ni volas lerni angle, ruse, france, germane, ni devas ankaŭ ellerni prononcadon de kelkaj fonemoj diferencaj de nia gepatra lingvo. Ne estas iel tro malfacile ellerni prononcadon de h kaj ĥ kun iom da klopodo. Foje min vizitis francino, kiu laŭdire ne kapablis prononci "mi scias", "descendi", kaj diradis mi cias, decendi. Post duonhoru ŝi tion laŭ mia ekspliko ellernis. Unue ŝi devis korekte legi frazon "ĉu vi havas cigaredon". Al germano mi instruis prononci puran "k" antaŭ vokalo, kaj do prononci kelo kaj ne germanmaniere kĥelo k.a. Fonemo ĥo havas ekzistrajton ne nur pro kaŭzoj de scienca leksikologio, sed pro la ĉi tie cititaj motivoj. Jes, oni devas ankaŭ en Esperanto dediĉi iom da peno por ĝin korekte elparoli. Nuntempa sontekniko /aŭ se al vi plaĉas, sontekniko/, la sonbendo, diskoj, povas nin sufiĉe helpi. Tion mi ne skribis ĉar mi estas ĉeĥo kaj ne ĉeko.

Jiří Kořínek

Ĉasto se stává, že hledáme přesný výraz pro určitý technický termín. Protože u nás dosud chybí termináře, budeme pomoci ing. J. Wernera z Brna připravovat pravidelnou rubriku 20 odborných výrazů pro praktické použití.

DEKDUO DA FAKAJ VORTOJ POR PRAKTIKA UZO /1/

Komunikas: Ing. Jan Werner

bagro - rýpadlo, bagr
banan-stopilo - babánek /el.tech./

bašo - plachta /na vůz, nákl. auto a p./
bavuro - otřep, hrot, ostržina /hut./
breco - preclík
ĉipo - ĉip /el.tech./
desino - desén, vzor
dezajno - design, výtvarné provedení /výrobku/
duon-tempo - poločas /sport./
-enz/ - techn. přípona označující látku, která je aktivně činná ve významu předcházejícího slovního kmene nebo základu
krakeno - kreker
ostento - stavění na odiv, okázalost
paterno - vzor, obrazec, charakteristické uspořádání
perturbo - porucha, rušení, interference /radiotech./
ramplo - rampa
rivelenzo - vývojka
senbavurigi - odhrotovat, odstraňovat ostržiny /otřepy/
skrapadoro - skrejpr
solvenzo - ředidlo
strado - dálnice

KDS

Sedlčany

KVALITAJ TRANĈ-PRODUKTOJ

Kuirejaj kaj viandistaj tranciloj ĝardenistaj tondiloj de diversaj tipoj tondiloj por la kureja prilaboro de kortbirdoj higiena ilaro - ungo-fajliletoj - raspiletoj por la malmola haŭto

Fabrikas KDS SEDLČANY ĈSSR

Eksportas MERKURIA Praha

RONDETA VIVO

HAVÍŘOV - La 23-an de aprilo interese prelegis pri sia vojaĝo al la 65a UK en Stokholmo s-ano ing. Karel Janouš el Ostrava, prezentis kolorajn diapozitivojn kaj diversajn informajn materialojn pri Svedio. ASt.

JABLONEC n.N. - Printempan pacan marŝon la 26.4.1981, kiu estis, ni povas diri, junulara, partoprenis ankaŭ junaj geesperantistoj de EK el Prago, Mělník, Roudnice n.L., Karlovy Vary. Ni dankas al organizantoj por perfekta organizo. J. Votrubeč



FRÝDEK - MÍSTEK - La 17.5.'81 perolis Anna Milatová el Trinec pri siaj vojaĝoj sub titolo Ĉiĉeronino en Kafejo Esperanto.

ZNOJMO - EK aranĝis la 9.4. Vesperon de E. kun kultura programo kaj ekspozicio de bildkartoj pri floroj el la tuta mondo. En la urba biblioteko estis aranĝita ekspozicio pri E-lernolibroj kaj de bildkartoj. V. Rotrekl prelegis en baza lernejo pri la signifo de E. Intereso garantias la aŭtunan kurson.



Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Medicinistoj korespondu amase kun E-grupanoj laŭ la adreso USSR, 450027 U F A, ul. Frunze 47, Baŝkirta medicina instituto, Sovet SNO aŭ al Klubo de Esperanto, U F A a/k 1125 USSR, 450025


15-jara Katerina Góma Dobrzyniewo, PL-89311 Falmierowo, Pollando deziras amike korespondi kun samaĝuloj.

Fortigu la komencantan movadon en historia urbo Novgorod. Por siaj 25 kursanoj ĝis 30-jaraj serĉas korespondantojn Skladnova Irina, poŝte restante, Novgorod 2, USSR 173002. Mi serĉas korespondantinon por interŝanĝi kolorajn b.k. kun motivoj de floroj, birdoj. Vincenc POPOVIČ, 561 67 MLADKOV, n-ro 45, Ĉeĥoslovakio

Bildkartojn pri ĉefurboj el la tuta mondo kun E-teksto kaj pri folkloraj kostumoj deziras interŝanĝi Vlad. Rotrekl, 66902 Znojmo-Dobšice, Ĉeĥoslovakio

Krucenigmo

Horizontale: A. Dolĉakva fiŝo/o; verkado/o; imitaĵo/o de juvelo. - B. Korpoparto/o; la unua parto de eldiro de Karel Capek kaj lia edzino Olga Scheinpflugová; parto/o de fusilo. - C. Vitra vazo kun mallarga kolo; oksido de bario ĉe ni troviĝanta; diligenta insekto. - Ĉ. Homparazita ŝimfungo/o; virseksa homido; ornamo/o de poemoj; en maniero de hejma besto; ĉefurbo de Kanado. - D. Senharigita preparita felo; akiri temperaturan 100° C /ĉe akvo/; konkuranto/o; la sesa monato/o; prezent/i/ al si en la spirito. - E. Multekosta metalo; grenkampa trudherbo; sinjorina model/o; portebla subĉiela loĝejo/o; vica numeralo. - F. Persona pronomo; persekuti kaptocelo bestojn en iu loko; arango/i/ trankvilon inter malamikoj; tiaj post kiuj nenio plu sekvas; sufikso por loĝanto en iu loko. - G. La dua parto de la eldiro. - Ĝ. Grava parto de maŝino; kelke da unuoj de elektra rezistanco; ripete voĉe komunik/i/.



Vertikale: 1. Trafikilo/o malpli peza ol la aero. - 2. Kokokri/i/. - 3. Negativa elektrodo; senvalorig/i/ paperon per manpremo. - 4. Subita sinmontro; specio de bov/o kun artikolo. - 5. Autombila konkurso/o; rilatanta malgrandan arbareton. - 6. Korinklino; supraj trarigard/i/ libron; - 7. Antikva profetino; naskipova estulo. - 8. Kemia element/o/K; malmola busparto/o. - 9. Korpa organo; spado/o por skermo. - 10. Veni returne al la forlasita loko; dispremi per dentoj. - 11. Arango de florpertoj en burĝono. - 12. Rilatanta la plej malgrandan materieron; tiu kvanto. - 13. Esprimvorto/o por farita bono; meblista materialo. - 14. Refleksiva adjektivo/pluralo/; superlativa adverbo. - 15. Regular/o/ de asocio; virina voĉ/o/. - 16. Montra adjektivo; ekzisti ene. - 17. Restaĵoj de ruinigaĵo; loka prepozicio. - 18. Akiri por mono; nordeuropa. - 19. Speco de kolbaso; kemia element/o/ J. - 20. Nun aĉetita monkesto/o/. - 21. Adepto/o/ de hindua doktrino.

Helpo: C. Oksido de bario = barito. - Ĉ. Akori/o/. - 5. Rali/o/.
- 9. Rapiro/o/. - 11. Estivacio. - 21. Jogan/o/.

Adolf Staňura

Sendu al nia redakcio la ĝustan tekston de la eldiro, plej malfrue 14 tagojn post ricevo de tiu ĉi n-ro de Starto. Tri lotitaj solvintoj ricevos libropremiojn.

INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

EK T Ĥ E B í Ĉ, loka grupo de ĈEA daŭre ekzemplodona!

El la kluba cirkulero ni notas speciale:

14 dumvivaj membroj de ĈEA.

La membroj promesis labordoni por Lančov '81 940 horojn, por la Domo de prof. Kilian 502 horojn, por la klubejo 84 horojn, por aliaj laboroj 400 horojn kaj por garantii la funkciadon de SET 799 laborhorojn... entute do 2 725 horojn!

Intersangaĵ restadoj ankaŭ por familioj kun infanoj estos nunjare kun Velingrad /kiu posedas sian filion en Burgas/ en Bulgario, kun GDR kaj partopreno de kursoj en Hungario-ĉie sub specialigitaj favoraj financaj kondiĉoj.

La Klubo denove volas participi la financon subtenon el ŝtataj fontoj por finkonstruo de novaj lavejoj kaj WC, por plilongigo de asfalta alvetura ŝoseo ĝis la enirejo al la Tendaro. La reprezentantoj tiucele partoprenis koncernajn traktadojn kaj ankaŭ tiujn en distrikta urbo Znojmo pri novkonstruo de transformo elektroflua stacio por la Golfo de Lančov. La nuna jam ne sufiĉas plenumi la bezonojn de naŭ rekreaciaj entreprenoj.

Pri la lastatempaj publikaĵoj ni jam informis.

jelĉ

Ni havas por vi kelkajn novaĵojn de ni eldonitajn aŭ importitajn. Por daŭrigi nian eldonan laboron certe vi komprenas, ke estas nepre bezone librojn ankaŭ disvendi. Temas ĉefe pri

MEZE DE EŬROPO - libro, kiu pritraktas nian historion ekde la plej fora pasinteco ĝis samtempo. Granda parto estas dediĉita al la tempo de Karlo la I^{va}. La koverto estas plurkolora bildo de Hradčany - polurita. La teksto sur 100 paĝoj en perfekta Esperanto - pluraj ilustraĵoj. La libro estos certe taŭga donaco por viaj gekonatuloj eksterlande, sed ĝi helpas ankaŭ al vi per siaj multaj informoj. La formato A5, prezo 15 Kčs aŭ 5,5 guldenoj. Mendojn akceptas la sekretario de la Asocio. Lokaj grupoj, kiuj mendos minimume 25 ekzemplerojn havos rabatitan prezon.

Karel Čapek: **RAKONTOJ EL LA UNUA POŜO KAJ EL LA DUA POŜO** - jen la titolo de nia dua eldonita libro. 380 paĝoj, perfekta traduko de Josef Vondroušek, ilustraĵoj de nia kunlaboranto M. Labaš. Formato ankaŭ A5, prezo 27 Kčs aŭ 11 guldenoj. La koverto same plurkolora, polurita.

SALUTON EL ĈEĤOSLOVAKIO estas plua el la serio de koloraj bildkartoj, kiujn ni eldonis lastatempe. La poŝtkarto havas kelkajn fotobildojn el Bohemio, Moravio kaj Slovakio kun teksto en Esperanto. Mendebla en nia Asocio. Prezo 1,60 Kčs, minimuma mendo 10 pecoj.

En nia vendejo estas je via dispono ankaŭ libroj el Britujo, Francujo, Finnlando kaj Hispanujo. Deziru la proponliston kaj elektu. Same ni havas librojn el Bulgario, Hungario, Germana Demokratia respubliko, Pollando kaj Sovetunio. Multajn el la titoloj vi ne konas.

SEFT = Somera Esperantista Familia Tendaro '81

Tempo: 22-a ĝis 29-a de aŭgusto 1981

Loko: Tendejo C-86 Thomsdorf en norda GDR, ĉirkaŭ 35 km oriente de urbo Neustrelitz /sude de urbeto Feldberg/.

Kondiĉoj: - SEFT estas kuna tendaro de Esperantistoj surbaze de memprizorgo, do ĉiu devas esti absolute memstara /tendo, mango, programo/
- kiel unikan servon la Distrikta Estraro Esperanto nur peras la adresojn inter la tendumantoj.

Detalaj informoj: Werner Pfennig, GDR-2000 Neubrandenburg, Leibnizstr. 5/67.



BUI HANH CAN el Vjetnamio en niaj lokaj grupoj Esperanto-rondeton Vitkovice vizitig en aprilo vjetnama gasto BUI HANH CAN, kiu prezentis al 60 aŭskultantoj entuziasman paroladon pri laboro de vjetnama pacdefendantoj. Li estas ĵurnalistoj kaj membro de Vjetnama pacdefenda asocio. Dum lia parolado estis prezentitaj 120 koloraj diazitivaj pri vivo en Vjetnama socialisma respubliko. Li vizitis ankaŭ ceterajn urbojn - Praha, Mělník, Koprivnice kaj Frýdek-Místek, kie lokaj esperantistoj montris el li lokajn vidindaĵojn. Li vizitis ankaŭ la regionon de Altaj Tatroj kun Poprad. Lia rondvojaĝo bone impresis kaj plifirmigis ĉeĥoslovakajn-vjetnamajn amikecon.

Drah.Kočvara

O k d e k j a r a ESPERANTISTA KLUBO en B R N O jubileas

Sur la teritorio de siama Aŭstro-hungara imperio en la jaro 1901 estis fondita en Brno unua klubo de esperantistoj. Inter la fondintoj estis Karel Pelant, redaktoro de *Dělnické listy*, V. Kovanda, fondinto de konsumo kooperativo *Včela* kaj deputito Josef Hybeš, la plej signifa aganto de laborista movado en Brno.

Ek de ĝia komenco la membroj dissemis pacideojn kaj penis pri konatigo de nia kulturo eksterlande. Kulturaj vesperoj ĉu muzikaj, teatraj, poeziaj aŭ prelegaj sub la gvido de altstaraj profesiaj artistoj ĉiam signifis por centoj kaj centoj de publiko dum longaj jaroj neforgeseblajn travivaĵojn. Ni ne preterpasu ankaŭ kvin radiokursojn de la Internacia lingvo, kiuj ja elfontis en Verda stacio, en kies programoj rolis elstaraj artistoj Karel Höger, Fr. Kožík, Zdeněk Světlý, Vl. Leraus, Bezdíček kaj ceteraj...

La Klubo aranĝis en Brno ankaŭ kvar multvizititajn tutŝtatajn esp.kongresojn, plurajn internaciajn renkontigojn kaj ŝeminariojn. La vizitanta gastoj el la tuta mondo individuaj aŭ pogrupoj dum jardekoj estis pekalkuleblaj.

La Klubo aranĝis ankaŭ plurajn ekspoziciojn, vokalajn koncertojn de kvar eksterlandaj kanthoroj kaj ĉiam zorgas pri aktiva kunlaboro en ĉiu signifa agadkampo kup urbaj, regionaj kaj tutŝtataj autoritatoj. Ĝia biblioteko daŭre kompletigata havas 1600 titolojn.

Pluraj membroj ĉe diversaj okazoj estis honordistingitaj...

Modela laboro de modela Klubo meritas ne nur nian dankon, sed grandan laŭdon kaj admiron!

- jelo -

MEDICINISTAJ INFORMOJ

SANO ESTAS
APARTA ALDONO
DE STARTO.
APERAS 4 FOJE
JARE.
JARABONO
24 KĈS AŬ
10,50 GLD.
INTERESAJ
ARTIKOLOJ
EL LA TUTA
MONDO MENDU
ĈE NIA ASOCIO
AŬ ĈE NIAJ
PERANTOJ.



sano

STARTO - nepravdelnŭ vŝstnik Ĉeskŝho esperantskŝho svazu, Jilskŝ 10, 110 00 Praha 1, vydŝvenŭ pro potrebu ŝlenŭ svazu. Vychŝzŭ 6x roĉnŝ. Ze obsah tohoto ŝisla odpovŝdŝ PhDr Jaromŝr Jermŝr a Zdenko Krŝmskŝ. Grafickŝ ŭprava Milan Labaŝta, kresby Pavel Rak. Tisk zejŝŝtuje Technickŝ ŭstředŝ knihoven Praha. Předŝno do tisku 1.1.1981. Dohledacŝ poŝta Praha 07, sniŝenŭ poplatek za poŝtovnŝ povolen ředitelstvŝ pŝŝt Praha pod ŝ.j. P/1-1267 ze 6.4.1979.

STARTO - presorgeno de ĈEA, Jilskŝ 10, 110 00 Praha 1, ĈSSR, aperas sesfoje jare.

NIA OFERTO

o d z n a k y	ŝ Kĉs
hvŝzdiĉka 5 mm ŝ	4.-
hvŝzdiĉka 5 mm ŝ s E	5.-
mŝrovŝ MEM	4.-
ĈSSR - 3 barvy	8.-
LET Lanĉov	8.-
KKEI sbŝrat. 2 barvy	5.-
trojŭhelnik s E-O	5.-
hvŝzda /bŝlŝ okraj s E/	5.-
Veterana klubo	5.-
ŝelezniĉŝrŝskŝ	5.-
rybŝrŝskŝ /sbŝrat./ 10 barev	5.-
medicŝnskŝ	5.-
jugoslŝvŝskŝ	6.-
erb s E-O	8.-
kulatŝ s E-O ŝ 9mm	8.-
hvŝzda s E kulatŝ a hranatŝ	8.-
hvŝzda s E	8.-
hvŝzda s E-O	8.-
La Progreso - Ŭ.Budŝjovice	2.50
Absolvento E-O	2.50
r ŭ z n ŝ	
nŝlepky Globus	1.60
-"- Lingvo internacia	2.60
-"- arŝŝk lingvo - malŝ /12 ks/	2.-
-"- arŝŝk lingvo - velkŝ /4 ks/	5.-
-"- arŝŝk mondpaĉa /12 ks/	2.-
-"- vŝroĉŝ Ŭ.Budŝjovice /3 ks/	2.-
propisoty /50 znakŭ/	27.-
zaŝehlovacŝ obtisky 2 druhŝ ŝ	5.-
kalendŝr posuvnŝ /vŝĉnŝ/	4.-
silonovŝ taŝka	15.-
plakŝt pro E-O kursy /moŝnost doplnŝt v astnŝ text/	-70
pohlednice Lanĉov s esper.textem	6.70
-"- Vranov	1.40
-"- Salutoj el ĈSSR	1.60
gramodeska Damjanov	44.-
k n i h y a u ĉ e b n i c e	
Kiliŝn Uĉebnice pro zaĉŝteĉnŝky	18.50
Ĉink Uĉebnice pro pokroĉilŝ	15.-
Ĉu vi parolas tendare /kreslenŝ/	19.-
La tuta E-O /Seppik/	16.-
808 - Kiliŝn	2.-
kapesnŝ slovnŝĉek ĉeskŝ	14.50
slovnŝk slovenskŝ	40.-
E-o do vrecka	10.-
LMR - La mondo rakontas	8.-
Svŝtadŝl bez tlumoĉnŝkŝ - Knŝchal	13.-
Heraldika	35.-
SAEST 1980	39.-
Panoramo - Intima tripticho - Hromada	16.-

Baza literaturo krestomatio	39.-
Ĉiela birdo	23.-
De paĝo al paĝo	29.-
Endre Ady	6.-
Endre Ady La morto de la Ĉielarko	29.-
Kun sopira koro	29.-
Eterneco	8.-
Floraj ludoj	26.-
Filozofio de Fantomo	18.-
Nau jaroj en la infero	23.-
E-o sciencaj aspektoj /Dr.Blanka/	27.-
Böll - La perdita honore de iu Katarino Blom	37.-
Gutaro avoto	15.-
K.Capek - Povidky z jedné a druhé kapsy	27.-
Kořinek - Skizoj de usedom	3.-
Rosetti - Kredu min, sinjorino	30.-
Swift - Liliputo	10.-
La vero pri la Vjetnam-ĉinaj rilatoj...	6.-
Nguyen Trãi	6.-
Meze de Eŭropo /Karel IV./	15.-
Grigorov - Gardu la pacon	23.-
MacDermott - Apostolo de Libereco	49.50
Junulara kantareto	5.-
En maskobalo	29.-
Estona soveta poezio	8.-
Fučík - Reportaĝ psanā na oprátce	25.-
Historio de E-o 1887-1912	24.-
Burgoj kaj kasteloj	8.50
Hungaraj fabeloj	28.-
Kain a Abel	48.-
Anto super lulilo	4.-
Koncize pri MEM	8.-
Janusz Korczak	48.-
E-O por feriadoj	5.-
Bydgoszcz	3.-
-"- plaketa	27.-
Kvaropo	48.-
La filo de iŝtonkora homo /kreslené/	14.-
Steloj de Eger /kreslené/	14.-
La Mastro de korboja	5.-
Libro de romanoj	39.-
Juhan Liiv - Al apelujo ĝi flugas	5.-
Lumo de orienta Eŭropo	5.50
Alriĉaj homoj	12.-
Instrua Amuso /Marček/ - křížovky, humor	14.-
Wolkowska - Medallionoj	12.-
Ĝetodiko - demandaro	6.-
Nesvadba - La perdita vizaĝo	15.-
Prus - Peko de l'infaneco	20.-
Pri la varmo	21.-
Aceptaro de elektitaj sudbohemiaj manĝoj-supoj	5.-
Satiroj	31.-
Slezské písně - Bezruč	11.-
Sklavoj de Dio	45.-
Socipolitikaj aspektoj de la E-o movado	39.-
Slovaka antologio	34.-
Turista kantaro	20.-
Ušpienski - Lingvaj obstakloj...	5.-

KOVOVÉ METALAJ REMIZOJ GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbot-
avolo - duparta pordego - deklina
tegmento - sen planko - facila mu-
ntado au sur submuro au sur ebe-
na tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Largo 3030 mm alto 2450 mm estas
egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malon-
ga tempo 1-2 semajnoj liveras

INKLEMO

PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adre-
so de komerca fako: INKLEMO PRA-
HA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA
9, Spojovací 11, autelefonu al n-ro 83 09 49.
Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la
kooperativo. Transporton ni povas certigi. Re-
mizojn ni liveras nur al privatuloj.

VALORAS MENDI KUN 15% RABATO ĈI TIUN KOMPLETON

**RAKONTOJ
EL UNUA
POŜO
KAJ RAKONTOJ
EL LA DUA
POŜO**




**PREZO 27 Kčs
aŭ 11 gld**

**MEZE
DE EŬROPO...**



**I. LA HISTORIA KOMENCO
DE NIAJ NACIOJ**

**II. LA EPOKO
DE KARLO LA IVa**



**III. HUSANA REVOLUCIA MOVADO
KAJ HUSANAJ TRADICIOJ
EN NIA HISTORIO**

**IV. ESTIĜO
DE LA ĈEĤOSLOVAKA ŜTATO**

**PREZO 15 Kčs
aŭ 5,5 gld**

ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO, scienca-teĥnika sekcio

Fabrika filio de la ĈEĤOSLOVAKA SCIENTA-TEĤNIKA ASOCIO
„SPOLCHEMIE“ en Ústí nad Labem

KOLEKTO DE LA SEMINARIAJ REFERAĴOJ

**APLIKO DE ESPERANTO
EN SCIENCO KAJ TEĤNIKO
1980**

1. LA VIVOMEDIO HODIAŬ KAJ MORGAŬ
2. PROBLEMOJ DE LA FAKA LINGVO KAJ TRADUKO

**PREZO 39 Kčs
aŭ 13 gld**

**RIPORTO SKRIBITA
EN LA PENDUMILA
MAŜO**



**JULIUS
FUČÍK**

**PREZO 25 Kčs
aŭ 10 gld**